



ISSN 0393-2907

LITERATURA FOIRO*decembro 2015, n-ro 278*Dumonata revuo, organo de LF-koop, fondita en 1970 de literatura rondo "La Patrolo"
Posedas, eldonas, administras Kooperativo de Literatura Foiro (LF-koop), Svislando.

Carmel Mallia <i>Uragano</i>	uverturo	283
Giorgio Silfer <i>Strasser certe ne estas straso</i>	nia kovrilo	284
Johano Strasser (Vinko Ošlak) <i>Spikume el "La sono de l' fanfaro"</i>	germana literaturo	286
Giorgio Silfer <i>La popolo de la formikoj</i>	aktuale	289
Svetana Aleksijeviĉ (Zlatoje Martinov) <i>Pri la silento de polvo</i>	Nobel-premio	292
Davor Klobuĉar <i>La plej defia traduka tasko</i>	eseo	295
Trevor Steele <i>Ek al Marina!</i>	premiere	300
Francisko Degoul <i>Biblio kaj Korano</i>	komentario	306
Renée Triolle <i>Ĉe ventokruciĝo</i>	kino	308
Armando Zecchin <i>Laudato si' - la poemo kosma</i>	religio	310
Zahari Karabaŝliev (Venelin Mitev) <i>Historio pri kuko</i>	balkana prozo	314
Nicolino Rossi <i>Mitoj kaj legendoj pri la vulkano Vezuvo</i>	ekskluzive	318
Carmel Mallia <i>Transflugo (dua parto)</i>	rememoroj	322
Carlo Minnaja recenzas <i>Spirito kristana, sed ne bigota</i>	en vitrino	326
Zlatoje Martinov recenzas <i>Konvinka kaj harmonia liriko</i>	en vitrino	328
Julian Modest recenzas <i>Kiu strebas al vero, trafas suferon</i>	en vitrino	330
Massimo Acciai <i>Ĉu artefarita lingvo estas paradokso?</i>	interlingvistiko	332

Ĉefredaktoro: Zlatoje Martinov. Asista redaktoro: Perla Martinelli. Redakta stabo: Tomasz Chmielik, Marie-France Conde Rey, Manuel de Seabra, Jarlo Martelmonto, Carlo Minnaja, Julian Modest, István Nemere, Bertil Nilsson, Leif Nordenstorm, Vinko Ošlak, Nicolino Rossi, Giorgio Silfer, Sara Spanò, Armando Zecchin, Walter Ŝelazny. Redaktejo: ĉe Zlatoje Martinov, Otona Zupancica 24, 11070 Novi Beograd, Serbio, <lofo@esperantio.net>. Administrejo: LF-koop, CP 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, <lfkoop@esperantio.net>.

La plej defia traduka tasko

La eposo *La morto de Smail-agao Ĉengiĉ* de la fama kroata verkisto Ivan Maĵuraniĉ, aperinta en 1846, estas perlo de la nacia literaturo kaj deviga legaĵo en kroataj lernejoj.

Esplorante la historion de la esperanta movado en Kroatio, mi rimarkis, ke tiu ĉi libro havis en ĝi tre interesan sorton. Inter la jam riĉa kroata literaturo, esperantistoj komence de la 20^a jarcento elektis por tradukado unue tiun ĉi libron. Kaj pri ĝia tradukado al esperanto okupiĝis eĉ kvin personoj en diversaj jardekoj. Pri tio temas en ĉi artikolo. Sed, unue pri la aŭtoro kaj lia verko!

Aŭtoro. Ivan Maĵuraniĉ (1814-1890) estis kroata poeto, lingvisto kaj politikisto. Lia sola grava originala poezia verko estas ĝuste ĉi tiu eposo. Krom tio li majstre kompletigis mankantajn partojn de la granda kroata baroka eposo *Osman* (de Ivan Gunduliĉ), uzante lingvon kaj stilon el tiu epoko. La pinto de lia politika kariero estas, ke li inter 1873 kaj 1880 estis kroata banuso, t.e. subreĝo por Kroatio. Kroatio tiam estis parto de Aŭstrio-Hungario, sed havis aŭtonomion kaj sian propran estron elektatan el inter la kroata nobelaro. Maĵuraniĉ escepte estis nenobelo. Lia

ĉefa politika rezulto estis modernigo de la lando.

Verko. La fabulo de *Smail-agao* ne okazas en Kroatio, sed proksime, en la turke regataj landoj Hercegovino kaj Montenegro. Turka mahometana agao (loka estro) Smail tre kruele traktas malriĉajn kristanajn vilaĝanojn (“rajahon”), kiuj por li estas malgravaj estaĵoj, el kiuj li nur volas elpremi tro altan imposton. Krom tio li ordonas mortigi kaptitajn kristanajn batalantojn.

Fine la agaon atingas justa puno: la subpremata popolo organiziĝas, atakas lian taĉmenton kaj la agao mortfalas en la batalo. Kvankam li per ĉiuj rimedoj volis atingi postmortan gloron pro sia ŝajna batala kuraĝo kaj ŝajna karaktero grandeco, la verkisto montris, ke la posteuloj konas la agaon laŭmerite nur kiel tiranon kaj fiulon, kaj eĉ ridindigas lian memoron.

La fabulo baziĝas sur vere ekzistintaj homoj kaj lokoj. Sed la aŭtoro permesis al si pro poezia libereco fari ŝanĝojn. Jes, kristanoj estis duarangaj civitanoj en la otomana imperio kaj lokaj turkaj estroj ofte ilin traktis malbone, foje eĉ kruele. La vera historia agao Smail ne estis tia persono kaj

de Davor Klobučar

krome li pereis en tute aliaj cirkonstancoj. Tamen, tio ne niom malgrandigas la valoron de la verko.

La aŭtoro volis montri, ke tiranoj ĉiam devas fali, sklavoj iam nepre liberiĝos kaj fine la historio la tiranojn malfavoros.

La stilo kaj ritmo de la eposo intence estas tiu de tradiciaj popolaj poemoj, kiuj kutime parolas pri historiaj okazaĵoj. La verko estas plena de turkdevenaj vortoj, kiuj tamen enhejmiĝis inter slavaj popoloj sur la balkana duoninsulo, sed estas problemo klarigi ilin al alilandanoj. Tiu stilo kaj vortrezoro donas al la verko certan koloron, kiun bedaŭrinde estas malfacile transporti al esperanto. Krom tio, mallongaj versoj (foje dek- kaj ofte nur oksilabaj) estas mallarĝa kadro por enmeti tiom da akraj bildoj, fortaj sentoj kaj koncizaj saĝaj konkludoj, ĉio ĉi faras tradukadon al esperanto peza tasko, sed ankaŭ granda defio. Ne mirinde, ke tiomaj homoj entreprenis tiun taskon!

Bedekoviĉ kaj Stalzer tradukis. En 1911, aperis la unua traduko de la granda verko. La 1100-versa eposo konsistas el kvin kantoj, sed aperis tradukoj de nur la komencaj du, en du sinsekvaj numeroj de *Kroata Esperantisto*. Kial ne pli? Eble la tradukintoj laciĝis, eble pro baldaŭa ĉeso de la gazeto, sed eble ankaŭ pro negativa kritiko? La unua tradukinto estis “la kapo” de la nacia esperanta movado, s-rino Danica Bedekoviĉ. Kaj ŝia “partnero” en tiu laboro estis juna Ivan Stalzer.

Li venis el Rijeka por studi juron en Zagreb. Kiel aktiva esperantisto, li estis tiutempe eĉ delegito de UEA en Zagreb. Sed la kritiko de ilia traduko venis de “la alia kapo” de la sama movado, de Mavro Ŝpicer mem! Ŝpicer skribis: *...por tia ĉi entrepreno ne sufiĉas nur la teoria kono pri la gramatiko kaj vortaro, necesas ĉi tie profunda kono de la spirito de la lingvo al kiu oni tradukas, kaj ankaŭ iom da propra poezia talento... Bedaŭrinde, mi devas diri, ke (...) ekzistas eĉ ne spuro de la poezia beleco de la originalo. Prozecaj vortoj enpremitaj en literajn kadrojn ne jam estas versoj, kaj centoj da tiel kunfrapitaj vicoj ankoraŭ ne estas poezia verko. Mi ne volas entrepreni nombradon de arego da gramatikaj malregulaĵoj kaj malglataj versoj...*

Ankaŭ mi rimarkis multajn erarojn aŭ malglataĵojn, kaj opinias la tradukon plibonigenda. Sed mi ne povus diri, ke la tradukintoj malbone konis la lingvon aŭ malhavis certan talenton. Ho, ne! Multloke mi trovis en la traduko tre spritajn solvojn. Tio signifas, ke kroataj esperantistoj – kaj ĉu ne ankaŭ nia verda lingvo mem? – estis en iu pionira epoko, kiam la sperto ankoraŭ mankis. Kaj cetere estis iom tro ambicia la elekto de la tradukobjekto!

En la artikolo de Ŝpicer eble oni povas legi kaŝitan rivalecon inter s-rino Bedekoviĉ kaj li. Sed se oni volas esti honesta plene, oni devus rimarki, ke li ne plene refutis ŝin. Li ja



konsilis, ke oni daŭrigu la tradukadon, sed kun multe pli granda atento. Nu, tio tamen ne okazis.

Zlatko Hribar tradukis. Mi trovis per interreto en la gazeto *Hrvatska revija* (1931/4/1-6, p. 362) ke ankaŭ s-ro Zlatko Hribar en 1925 tradukis *Smail-agaon* al Esperanto, sed lia manuskripto ne publikiĝis. Nun ne estas konate, kio al ĝi okazis. Tamen, tiu traduko plialtigas la nombron de la tradukoj.

Ŝpicer kaj Stalzer denove. Ŝpicer post longa 20-jara paŭzo revenis al la esperanta movado en 1932, per teksto en *La Suda Stelo* pri la komenco de la esperanta movado en Kroatio. Reage al tio respondis en alia numero Ivan Stalzer (kuntradukinto de Smail-agao el 1911):

Mi bedaŭras, ke s-ano Mavro Ŝpicer (...) eĉ atakas s-inon Danica Bedekoviĉ, la animon de nia antaŭmilita movado en Zagreb. Kune kun s-ino Bedekoviĉ mi tradukis kaj aperigis en Kroata Esperantisto la du unuajn kantojn de La morto de Smail-agao Ĉengiĉ. Post la apero de la unua kanto s-ano Ŝpicer atakis nin en Pokret. Ne dezirante nun polemikadon, mi tamen devas konstati, ke post lia atako aperis ankoraŭ traduko de la dua kanto, do ne estas ĝuste, ke post mallonga gazetpolemiko la provo krake fiaskis, ĉar la atako neniel influis la tradukon, kiun ni ĉesigis nur pro malfacilaĵoj ĉe Kroata Esperantisto...

Ŝpicer tradukis. Tamen, Ŝpicer ne nur polemikis, sed ankaŭ mem tradukadis *Smail-*

agaon kaj en 1933, do post 22 jaroj, aperis lia propra kompleta traduko. Ĉi-foje temis pri memstara libro, kiun eldonis la gravega jugoslavia esperanta gazeto *La Suda Stelo* (aperanta inter 1932 kaj 1973 kun kelkaj interrompoj). Lia traduko estis pli bona kaj siatempe ege laŭdata. Tiel ekz. iu persono sub la pseŭdonomo *D-ro L.* (verŝajne d-ro Leo Kun, redaktoro de *La Suda Stelo*) skribis:

La esperanta traduko de La morto de Smail aga Ĉengiĉ distingiĝas per samgenia poeta reprodukto de originalaj versoj. Tiu traduko estas vera triumfo de Esperanto kiel literatura lingvo. La eposo de Maĵuraniĉ en la esperanta traduko de s-ro Mavro Ŝpicer konservis la plenan ritmoforton, plastikon kaj freŝecon de la originalo. Oni povas diri, ke ĝi estas vera majstroverko de la tradukarto!

La Suda Stelo, en februaro 1933, havas jenan tekston iom eksterliteraturan, sen aŭtora subskribo:

La traduko de tiu, unu el la plej belaj naciheroaj epoj en Esperanton, plenumis ne nur literaturan taskon, sed eĉ pli, ĝi estas kulturhistoria dokumento por la tuta eksterlando, kiu nur malmulte, preskaŭ neniom konas la malfacilan vivon de la sudslavoj en la pasinteco (...) Por kompreni la grandan poezian valoron de tiu ĉi eposo, kiu inter multnombraj popolaj kantoj glorigas la batalon de nia nacio kontraŭ la turkaj imperialistoj, ni devas rerigardi kaj image antaŭ niajn okulojn pentri la sangajn,



suferoplenajn bildseriojn de nia estinteco...

Kalocsay recenzis. La granda esperanta poeto kaj stilisto Kálmán Kalocsay verkis en 1933 recenzon en *Bibliografia gazeto* (2/1933, p. 25-26):

La poemo, malgranda epopeo, ĉerpita el la krudaj tempoj de porekzistaj liberbataloj, impresas forte kaj freŝe. Ankaŭ tra la traduko oni eksentas la radikan popolan aromon de la versoj, ian prafortan, primitivan terodoron, kiu sentiĝis en la lakonaj frazoj, penso-ritmoj, vortripetoj, en la simplaj sed fortefektaj bildoj, en la sugestaj komparoj (...). Ĉio ĉi faras la verkon unu el la rimarkindaj trezoroj de la mondliteraturo (...). Koncerne la tradukon, oni devas plene rekoni la grandan fervoron, entuziasmon kaj klopodon de la honorinda tradukinto. Li havis antaŭ si malfacilan taskon (...) El ĉiu verso oni vidas la konsciencan penon, la amon al poemo: kiel li klopodis kiel eble plej fidele kaj perfekte proksimigi la tradukon al la originalo, transdoni ties ĉiujn belaĵojn.

Ĉu ankaŭ vi, kara leganto, demandas vin: kial Kalocsay simple ne komencis la recenzon per la vortoj: jen unu nova majstra traduko? Ĉar ankaŭ tiu traduko havis sufiĉe da plibonigendaĵoj! Porinforme, Mavro Ŝpicer mortis baldaŭ, en 1936.

Velebit tradukis. La historio de la esperanta Smailagao ankoraŭ ne finiĝis! En 1972, aperis traduko de Josip Velebit, la elstara kroata espe-

ranta tradukisto. La eldonisto estis tiama Kroata Esperanto-Ligo (hodiaŭ: Kroata), kaj la tekston kontrolis alia fama kroata esperanta tradukanto, Ivo Rotkviĉ. Ĉi tiu traduko laŭ mi estas multe pli bona ol tiu de Ŝpicer. Tamen, por internacia leganto kiu ne konas la kroatan originalon, nek la tradukon de Velebit, mi povas ĉi tie nur citi kelkajn opiniojn.

Kalocsay denove! Kalocsay, la fama esperanta verkisto denove eldiris sian opinion, ĉi-foje en *Hungara Vivo*, en 1973:


La unuan tradukon, siatempe, mi recenzis kun multa malfacilo, ne volante aflikti la oldan meritan pioniron, en kiel eble plej dolĉan pilolon mi devis paki la malperfektaĵojn de lia laboro. Nun mi estas en nekompareble pli favora situacio: la nova traduko de J. Velebit estas nekompareble pli bona ol la antaŭa. Se en la malnova traduko la valoraĵoj de la verko validiĝis malgraŭ la traduko, nun, per la lerto de la nova tradukinto ili estas eĉ pli reliefigitaj. Kelka pezeco de la lingvaĵo ŝajnas konscie farita por reprodukti la primitivan praforton de la originalo. Ankaŭ la iometajn poeziajn licencojn kaj sinerezojn mi ne pre aprobas. La sola, kiun mi riproĉas, estas kelkaj kunfandoj de substantivo kun ĝia epiteto adjektiva (bonĉevalo, bonpaŝtisto). Mia opinio, se formo kaj gramatiko neeviteble kolizias, la antaŭa devas cedi, eĉ se tio kostas sinerezon aŭ ion similan. Speciala ĝojo estas, ke jen nova retraduko de klasikaĵo – tio

mem montras la evoluon de la lingvo kaj de ĝiaj poeziaj uzantoj.

Kompara analizo. Interese, ke en 1988, en la serblingva tradukrevuo *Mostovi* du serbaj esperantistoj, **Jovan Zarković** kaj **Zlatoje Martinov** provis sistemece, preskaŭ frazon post frazo, kompari tradukojn de Ŝpicer kaj Velebit, aŭ pli bone dirite: kompari ties tradukojn de la unuaj du kantoj kun la kroata originalo. Ili preferis la verkon de Ŝpicer, kaj jen fragmento el iliaj argumentoj:

Konsiderante la tuton, inter tiuj ĉi du tradukoj estas konsiderindaj diferencoj. La traduko de Ŝpicer restas multe pli proksima al la originalo je preskaŭ ĉiuj niveloj, kvankam pro forta laŭvorta tradukado ĝi estas foje ne sufiĉe komprenebla al nejugoslavia esperantista leganto. La traduko de Velebit estas pli klara al la leganto kiu ne konas la originalon, sed en neakceptebla kvanto ĝi deflankiĝas disde la originalo, kaj per strukturo, kaj per formo kaj metriko, samkiel rilate al la originalaj poeziaj bildoj, kaj finfine ankaŭ per la kompleta impreso kiun ĉi eposo donas al la leganto (...) Per tradukado oni ne rajtas simpligi la originalon por pliproksimigi al la leganto malfacile kompreneblajn nociojn (historiajn, etnokulturajn) (...) dilemo ne povas esti: en preskaŭ ĉiuj konsideritaj elementoj la traduko de Ŝpicer el 1933, ege superas tiun modernan de Velebit.

Mia persona impreso estas, ke la traduko de Velebit estas la



plej bona. La serbaj samideanoj laŭ mi iom troigis. Unue, ili analizis nur du kantojn, tiujn malpli grandajn. Kaj eble ilia analizo koncentriĝis nur al la frazoj kiuj favoras Ŝpicer? Due, ne estas tiom granda peko, se oni foje provas proksimigi al la internacia leganto ion tute nekompreneblan. Oni ja povas tion klarigi piednote, sed se la piednotoj tro multas, kial ne foje ankaŭ en la teksto? Kaj rilate la formon: jes, pure matematike oni povas diri, ke la tradukita verso havas 9 aŭ 11 silabojn anstataŭ 8 aŭ 10, sed mi konsentas kun Velebit ke ekzistas larĝa ebleco konsideri certan songrupon jen unu, jen dusilaba. Sed eble mia impreso estas nur provizora, kaj eble mi ĝin iam ŝanĝos. Aŭ mi devus fari novan tradukon mem?

Ĉiu artikolo bezonas konkludon, sed ĉi tie ia definitiva konkludo verŝajne ne eblas. Mi nur esperas, ke mia teksto inspiras la samideanaron al profunda pensado pri la literaturo. ☘